



MONATO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

Kosto de abono por jaro: Skandinavaj kronoj 4,00 — hungaraj kronoj 5,50 — frankoj 5,75 — rubloj 2,00 — germanaj markoj 4,50 — portugalaĵaj rejsoj 1200 — brazilaj rejsoj 2500 — dolaroj 1,25 — ŝilingoj 4 1/2.

Pago por anoncoj: 15 oeroj — 20 heleroj — 20 centimoj — 8 kopekoj — 15 pfenigoj por duonpaga petitinio. — 10% rabato por duonjara, 25% rabato por tutjara anoncado; ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento

Adreso de l' redakcio: **Paul Nylén**, en la redakcio de »Vårt Land», Stockholm, Sverige (Svedujo). — Adreso de l' administracio: **Paul de Lengyel**, en Szegzárd, Magyarorszáq (Hungarujo). — Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro; pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la administranto.

INTERNACIAJ SOCIETOJ ESPERANTISTAJ.

Fondi Esperantistajn klubojn kaj societojn estas io tre bona kaj rekomendinda. Kaj konservi ilin fortaj, kaj en ili kaj per ili ion agadi por la Esperanta afero estas io ankoraŭ pli bona. Pri tio ĉiuj estas konsentaj.

Sed, kiam societo estas ekkomencata, tiu ĉi — se ĝi volas bone plenumi sian celon, nome akceli la aferon — devas limigi sin en la limoj, kiuj povos esti la plej konvenaj por ĝia ekzistado kaj elvolviĝo, kaj la plej prosperaj por la afero entute.

Ĉu estas do oportune fondi *diversajn* internaciajn societojn?

Esperantisto sendube ne havas la okazon esti membro de ĉiuj Esperantistaj Societoj. La idealo en tiu ĉi rilato estus laŭ mia opinio tio, ke ĉiu — se li do estu ano de tia societo, kio devas ja esti grava tiel por li mem kiel por la afero entute — estas membro de la plej proksima loka klubo kaj samtempe membro de internacia societo.

Ĉu ekzistas ia internacia societo Esperantista?

Jes. Ĉar la »Societo por la propagando de Esperanto« en la lastaj jaroj elvolviĝis en tiu vojo, ke ĝi fariĝis internacia.

Tiam sin metas tiu ĉi demando: ĉu ni bezonas ankoraŭ pli da internaciaj societoj Esperantistaj?

Mi devas konfesi, ke mi ne povas kompreni la neceson nek la utilon de *du* societoj por absolute sama celo en unu sama loko. Kaj du internaciaj societoj Esperantistaj, kiuj per sia internacieco ampleksus la tutan mondon, estus ja fakte agontaj en unu sama loko — sin disvastigus ambaŭ samtempe en samaj landoj. Por kio do tio estus utila? Mi ne povas trovi ian alian kaŭzon de ia nova internacia societo Esperantista ol polemikon kaj reciprokan batalon. Io tiel malfeliĉa ĝis nun ne aperis; sed estas danĝero en la dualismo. Ĉar aŭ ĉiuj estus membroj de ambaŭ internaciaj societoj

aŭ — se ne — en unu sama loko unu persono apartenus al unu el la societoj kaj alia al la alia. La unua okazo — aparteni al du egalaj societoj por precize la sama celo en unu sama loko — estas sensenca kaj absurda; en la dua okazo elekto inter la du societoj sin prezentas al tiu, kiu volas aliĝi al tia societo, kaj tiuj por sia ekzisto kaj kreskado devas reciproke bataladi.

Sed, ĉu tia rilato povas esti bona kaj utila? — Mi prenas al mi la liberon pri tio ĉi dubi.

Ni havas — kiel mi jam diris — nian internacian societeton Esperantistan en la S. p. p. Esperanto. Ke tiu komencis sian agadon kiel *nacia* societo en la landoj francalingvaj, estas ja tute en sia bona ordo, ĉar ĉia elvolviĝo iras kaj devas iri el la malgrando al la granda. En la nuna tempo, kiam la S. p. p. Esp. elvolviĝis fariĝinte *internacia*, tiamaniere ke ĝi havas multon da membroj ĉie en la mondo en nefrancalingvaj nacioj, estus do la plej korekta kaj justa, ke kiam la tempo fariĝas matura por tio, oni faros la malgrandan aliformigon bezonatan por ke tiu societo estu internacia ankaŭ laŭ sia formo.

Krom tio, ĉiuj atestas la bonegan kaj meritan manieron en kiu la kondukantoj de la S. p. p. Esp. komprenis labori, disvastigi kaj akceli la aferon Esperantan.

Estas ja io natura, ke unu aŭ alia povas en diversaj detaloj kaj rilatoj havi ian propran opinion, kiu en ioma mezuro diferencas de opinio kiu sin montras en la S. p. p. Esp. kaj ĝia organo »*L'Espérantiste*«. Por doni ekzemplon, mi subsignita ne povas aprobi la tro dogman — laŭ mia opinio — severecon en lingva rilato aperantan en *L'Espérantiste* kaj kiun mi konsideras tro unuflankan. Tion ĉi dirante, mi pensas speciale pri la reguloj

de la verbigo — aŭ pli ĝuste: de la »neverbigo«, — kiuj kaŭzis kelke da polemiko inter s-roj de Beaufront kaj Kofman. Plu mi pensas pri la teruro, kiun sentas la francaj kondukantoj je la uzado de la refleksiva pronomo *si* laŭ la rusa maiero, kiu tamen estas logika kaj konforma al la spirito de Esperanto (tiu, kiu povas diri: »mi estas sindona kaj singardema«, ankaŭ laŭ la sama logiko devus povi diri »mi donas sin kaj sin gardas«.

Sed tion — ke ne ĉiuj povas plene aprobi ĉion, kion faras la alia, — tion ja la S. p. p. Esp. kaj ĝiaj kondukantoj ne havas kiel sian propran apartecon; tio ja estas io komuna pri ĉio homa.

En ĉio esenca mi aprobas plene la S.-on p. p. Esp. kaj *ne povas* pro la neperfektecoj, kiujn mi trovas aŭ opinias trovi ĉe la dirita societo, *rifuzi rekomendi ĝin kiel la plej eminentan nacian kaj la solan internacian societeton Esperantistan*.

El tio ĉi supre dirita prezentiĝas nemalkompreneble mia penso pri la projekto doni al la nova societo esperantista en Södertelje la karakteron internacian.

Ke tiu sama societo varbas al si membrojn kaj eĉ agentojn en Francujo, pri tiu fakto mi ne trovas alian vorton ol — malsaĝeco.

Kiam svedoj turnis sin al mi kun la demando pri Esperanta societo, mi ofte rekomendis al ili la Societon p. p. Esperanto en Francujo, sed kiam *francoj* turnis sin al mi kun tia demando, mi *ĉiam* rekomendis al ili la S.-on p. p. Esp. Ĉar ne estas por tiu ĉi aŭ tiu *persono* aŭ por *aparta societo* nia laborado, sed ĝi ja estas *por Esperanto mem*; sekve oni devas forgesi sian propran klubon, se tio en speciala momento estas la plej bona por la *Esperanta afero*.

Paul Nylén.

OPINIO

pri la letero de s-rino A. Proĥoroviĉ-Koĉmarenko.

Kvankam mi ne estas kunlaboranto de nia gazeto *L. I.*, tamen, kiel ĝia abonanto kaj esperantisto, mi ankaŭ volas esprimi sian opinion pri la letero de s-rino Proĥoroviĉ-Koĉmarenko, presita en la n-ro 10—11 de l' pasinta jaro.

Mia esprimo estos nur en mallonga skizo, ĉar pli longajn kritikojn kaj pli precizajn analizojn de tiu ĉi letero, mi lasas al la ofenditoj kaj entute al tiuj personoj, kiuj estas tuŝitaj aŭ pli interesigitaj je ĝi.

Mi ne aprobas la leteron de s-rino P.-K. nur je tiom, kiom ĝi ne plaĉas al niaj kunlaborantoj, sed, de alia flanko, mi ne povas ne konfesi, ke la letero atingas ĝian signitan celon kaj eble eĉ pli bone, ol tio ĉi ŝajnas al multaj legantoj.

S-rino P.-K., skribante sian leteron, kredeble tre bone sciis, ke se ŝi skribus ĝin tuŝante nur plibonigon de la gazeto, tiam la senco de ŝia letero ne estus rimarkita, kiel pasis multaj artikoloj sen ia ajn aprobo aŭ kritiko de la samideanoj — tial ŝi tuŝis nian aŭtoran memamecon kaj la sukceso estas komprenebla.

Ĉu s-rino P.-K. havis rajton skribi tiel akre? — sendube *jes*, ĉar tio ĉi estis necesa por ŝia bona celo kaj la bono de nia gazeto.

Ĉu s-rino P.-K. estas prava, plendante je l' mankoj de nia gazeto? — ankaŭ *jes*, ĉar ne regula elirado, kompreneble, povas nur malhelpi al la afero. Gazeto, se ĝi estas efektive *gazeto*, devas nepre obeadi al la reguloj de ceteraj organoj de preso, alie ĝi ne estas gazeto kaj ne atingas sian celon.

Plue, pri ĝia enhavo mi povas diri ankaŭ, ke ofte ĝi estas tute ne interesa kaj, krom tio ĉi, en lasta tempo nia gazeto komencas

insultadi* neesperantistojn. Eble al iuj legantoj tia maniero ekplaĉos kaj ekŝajnos sprita, sed mi ne aprobas ĝin, supozante, ke insulto ne devas esti nia batalilo . . .

Ankaŭ mi konsentas kun s-rino P.-K. ke oni devas evitadi similajn »senkeliecoj«; kvankam tiu ĉi »pinglo« estas uzata en kelkaj naciaj lingvoj, tamen ne en ĉiuj, kaj ankaŭ ne devas esti uzata en Esperanto, kiu ja estas lingvo internacia kaj tute memstara.

Letero de s-rino P.-K. ne povas tuŝi la redakcion. La redakcio estas ekster iu ajn riproĉo, ĝi faras tro multe por nia gazeto kaj meritas sole dankon de tute nia esperantista rondeto.

Cetere mi ne pensas, ke akre skribita opinio pri la talentoj de kunlaborantoj *L. I.* malkuraĝos ilin por plua laborado. Plej gloraj artistoj, literaturistoj, muzikistoj k. t. p. estas ĉiam submetataj je l' kritiko, tamen ili ne ĉesas labori, kontraŭe, ili penas forigi siajn mankojn, kaj pli perfektigi. Krom tio ĉi, s-rino P.-K. ne estas ja orakolo kaj ŝia opinio pri talentoj ne povas esti absoluta — ŝi ankaŭ povas erari . . .

Mi volas kredi, ke kunlaborantoj de *L. I.* estas homoj tiom seriozaj, ke ili ne sole ne ĉesos labori en nia gazeto, sed, kontraŭe, penos utiligi vortojn de s-rino P.-K., rilatante pli senpartie al siaj verkoj kaj pli juste atentante je ĝiaj mankoj kaj pruvos sian ĝis nunan kaj estontan taŭĝecon por laboro en nia gazeto.

Nun mi diros ankoraŭ pri la influo de letero de s-rino P.-K. je l' abonantoj.

Mi estas abonanto de 1898 jaro kaj ĉe fino de l' pasinta jaro mi pensis jam: »ĉu ĝi meritas pluan abonadon?« kredeble mi decidus

* Tio ĉi estas grava riproĉo, kiun ni absolute ne povas preterlasi neklarigite. Ni ne volas kredi, ke s-ro W. de H. facilanime uzis vorton, kies akregega signifon li ne pesis; tiam restas kontraŭ ni preskaŭ skandaliga riproĉo, kiun li eljetis ne montrante eĉ la plej malgrandan motivon. Ni postulas ke tiu, kiu diris ke ni insultas, pruvu tiun ĉi sian diron.

ke ne, sed nun, kiam mi legis leteron de s-rino P.-K. kaj respondon je ĝi, mi estas tre interresigita de tiu ĉi demando, kiu ja estos larĝe priparolota kaj kompreneble tuj reabonis la gazeton. Ŝajnas al mi, ke multaj abonantoj agis egale.

Tial, laŭ mia opinio, el la supredirita elfluas, ke letero de s-rino P.-K., kiu sendube sinmontras al iuj legantoj, kiel ago tute ne pripensita, — alportos utilon al nia gazeto kaj ĝiaj kunlaborantoj.

W. Winnicki de Hujd.

»QUOT CAPITA TOT SENSUS.« *

Vivu nia kara kaj interesa gazeto »Lingvo Internacia« !

Al s-ro Ahlberg.

Certe *tempora mutantur*, kaj ankoraŭ la homspiritoj. Kredeble la kaŭzo de l' fakto, de vi montrita, estas ke en antikva tempo oni serĉadis »homon« kaj nun oni nur serĉadas »la malgrandan beston« (kiel ni france parolas).

Cresse Amicie de Villaret.

Orleans (Francujo), majo 1901.

Pri lernolibroj Esperantaj.

S-ro Charles Méray, la tre konata, influa kaj agega Esperanta vastigisto en Francujo, avizis min ke la »potencega libredona firmao« Hachette & K^{oo} entreprenis novan eldonon de lernolibroj Esperantaj, jam konsumitaj en tiu lando. Tiu ĉi ĝojiga ekkonitaĵo aliĝas al ceteraj egale ekkuraĝigantaj kiujn oni scias el la lastaj numeroj de »l' Espérantiste«. Ŝajnas

* La latinaj proverboj cititaj eble estas konataj de ĉiuj, eĉ de la personoj ne lernintaj la latinan lingvon, tamen ni ilin tradukas. »*Quot capita tot sensus*« = Kiom da kapoj tiom da opinioj. »*Tempora mutantur et nos mutantur in illis*« = ŝanĝas la tempoj, ni ŝanĝiĝas same kun ili.

ke la sorto de Francujo estas iri antaŭe de aliaj nacioj, kaj preni sur sin la faron de la spertoj je kiuj profitos la lastaj. Kredeble tio ĉi fariĝas ne simplokaze, sed ĉar tiu lando estas riĉa je fortoj de l' prudento kaj je spirito althoma.

La avizo de s-ro Méray pretekstigas diri pri sama afero ĉe ni, en Rusujo. Tie ĝi estas ne tiel bona. Antaŭ kelke da tempo mi havis okazon venigi kelkajn lernolibrojn Esperantajn el Varŝava en celoj propagandaj. Montrigis, ke por nemallonga jarspaco la afero de lernolibraĵo ĉe ni ne progresis; por diri pli precize, ĝi malprogresis.

La »vortaro universala«, 4-a eldono, 1901, estas videble pli malboneta ol la unua (1884) en papero kaj en presajo (ekzemple, preskaŭ ĉie *i* estas egalita al *l*) konservante la saman prezon. La bedaŭrinda kaj erara miksiĝo de literoj havantaj nenion da komuna inter si (*c* kaj *ĉ*, *j* kaj *ĵ*, *s* kaj *ŝ*) estas ankaŭ ripetita. Tio ĉi kondukas al eraroj kaj konfuzaĵoj, por novuloj en alta grado.

Vortaretoj unufoliaj germanaj daŭras manki. Longa, multjara daŭro. Tamen tiuj vortaretoj konsistigas tre malkaran kaj nemalŝatindan vastigilon Esperantan inter germanoj. Mi, ekzemple, en la lastaj 7—8 jaroj ofte havis bezonon skribi al diversaj personoj en Germanujo, kaj ne povas skribi Esperante, pro manko de vortaretoj-ŝlosiloj. Tiel ni suferis ambaŭ: Esperanto kaj persone mi. Estus utila kunligi al tiuj vortaretoj en nova eldono gramatikan regularon.

Malkaraj rusaj lernolibroj por facila disdono ankaŭ mankas.

Kontraŭe: sur la kovertoj Esperantaj eldonitaj per la societo »Espero« en S.-Peterburgo, estas anoncita ke »plena kurso de Esperanto« kostas 3.30 rublojn (8.90 frankojn). Mi opinias ke tia publikigo ne estas favora por la vastigo, timigante homojn. Mi ĉiam pensis ke »plena kurso Esperanta« devu kosti

10 kopekojn (0.28 frankojn), ne pli. Por Esperanto tio ĉi estus pli profitebla.

Kaj ĉu ne venis ankoraŭ la tempo havi bonajn vortarojn nacia-Esperantajn.

A. Z--v.

Pri vortaroj.

Sinjoro Redaktoro de la »Lingvo Internacia«!

Volu, mi petas, enpresi la sekvantan leteron.

En afero, kiel la nia, estas pli bone labori ol argumentadi antaŭ ol havi la ilojn konvinkajn.

Por kio do diri milfoje ke lingvo internacia estas utila afero, kiam eĉ sovaĝuloj komprenus, kiel ni, ke tio estas bona.

Sed, dirus la sovaĝulo, ĉu *ekzistas* tiu lingvo? — Jes, ni respondus. Li demandus ankoraŭ: ĉu tiu lingvo estas tuta kaj praktika? Pri tio ĉi ni estus iom embarasataj, ĉar ĝis nun ni ne havis la ilojn necesajn por ke la lingvo Esperanto estu tute praktika por ĉiuj popoloj. Mi ne volas diri per tio ĉi, ke Esperanto ne estis utila, sed nur ke Esperanto ne faris grandan progreson en la mondo. Vidu la adresarojn, ni apenaŭ estas 6000, restadante tiel malmulte nombraj dum centjaro pri nia progreso, ni estos pleje 50,000 en la jaro 2000-a.

Por kio do ni laboras tiel malrapide? Kalkulu do, kiom ni estos post 1000 jaroj, — ni estos do 550,000. Ni ne devas kalkuli la eble 1,500,000 kiuj scias iom la lingvon kaj kiuj ne enskribigis sin en la adresaroj, ĉar eĉ tiuj kiuj estas enskribitaj, multaj el ili ne povas skribi aŭ diri dek liniojn ne rigardante la vortaron.

Mi diris do ke ni unue devos havi la ilojn necesajn, kaj iloj estas nur la vortaroj; ĉar Esperanto jam estas tradukita en dudek lingvojn. Tio estas bona, sed io mankas. Tio estas la vortaro tute skribita nur en Esperanto, kiu enhavas la signifojn tutajn kaj precizajn je ĉiu vorto. Tiam ni estoj certaj ke la adresato komprenos ĉian vorton en la sama maniero kiel ni.

Mankas ankaŭ vortaretoj Esperanta-naciaj. Se ekzemple mi volos skribi leteron al fremdulo, mi nur havas malgrandan vortareton de 900 vortoj. Tiuj ĉi vortaretoj povas tamen ekzisti, sed kial mi ne havas vortareton de 5000 vortoj? Mi povus tiam paroli kaj skribi pri ĉiu objekto pli facile; mi volos ĉiufoje elspezi 20 centimojn plie por esti bone kaj facile komprenata. Cetero tio estos sen trompigo, ĉar la kelkaj linioj metitaj supre en la malgrandaj vortaretoj, kiujn ni havas, estas iom, se ne multe, mensogaj. Ŝajnas al mi, ke per dudek vortaretoj Esp.-naciaj aŭ pli multaj se estas eble, de 5000 vortoj kaj per la vortaro tuta nur skribita en

Esperanto ni faros tre grandajn progresojn. Efektive ni devas progresi aŭ neeviteble morti. Estas ankoraŭ alia trompigo en la sekvanta frazo, ekz. *la lingvo internacia ne intencas malfortigi la lingvojn naturajn*. — Ĝis nun kun la malgrandaj progresoj kiujn ni faras tio estas vera. Sed se ni estus ses milionoj anstataŭ ses mil, tiuj, kiuj scias iom, estus tiam 1,500,000,000; ĉu vi kredas, ke la lingvoj naturaj ne estus iom malfortigitaj?

Estas do multaj kontraŭdiroj aŭ ŝanceliĝoj en nia propagando, kaj plie — kial do ne malfortigi la lingvojn siadire naturajn? Ĉu tiuj lingvoj estas tiel bonaj?

Sendube ni ne faras kaj ne faros progresojn grandajn tiamaniere. Ni do faru alie; ni diru tute simple ke la lingvo faros progresojn en si mem kaj fine anstataŭos preskaŭ la aliajn lingvojn, se ne... la lingvo internacia estos penigo aŭ mokilo por ĝiaj partianoj tiom, kiom utilaĵo.

Vi respondos ke, malgraŭ ĉio, la lingvoj oficialaj ekzistas, kaj devas ekzisti multaj lingvetoj.

Tio devenas de la malfacilaĵoj de niaj lingvoj oficialaj aŭ provincaj, kaj ke la provincoj apartenas jen al tiu regno jen al alia. Tio estas do la du kaŭzoj kiuj malhelpas al la lingvoj oficialaj fariĝi bone konataj. Efektive la provinco diras: kial do mi lernas la lingvon oficialan, ĉu mia lingveto ne estas tiel bona, tiel bela, kiel la via devigata? krom tio, ĉu mi apartenas ankoraŭ al tiu regno la proksiman jaron. Oni ne diros la saman, kiam ni havos lingvon internacian; ĉar tiam la lingvo estos la sama ĉiam kaj ĉie.

Fine estas do dezirinde ke tiuj, kiuj verkas, faru, kunlaboru kaj kunhelpu por fari vortarojn ĉiuspecajn pri Esperanto. Kiam ni havos dudek aŭ kvardek vortaretojn Esperanta-naciajn de 5000 vortoj k. t. p. kaj la vortaron sufiĉe tutan nur skribitan en Esperanto, ni venkos sendube.

Via samideano

Johano Fréhis, pentristo.

6, strato de Skotlando, (Panteon), Parizo.

KRONIKO.

—
El Aŭstrujo.

— La monata gazeto »Welt-Correspondenz«, organo de la Internacia Societo Korrespondanta en Vieno enhavas en sia n-ro 4-a de majo lasta longan informan artikolon pri

Esperanto, verkitan de la ĉefredaktoro de tiu dirita gazeto, s-ro Theodor Helf, kiu faris al ni la plezuron transsendi al ni tiun n-ron kune kun du aliaj n-roj. La adreso de la redakcio kaj administro de l' gazeto estas: Vieno (germane: Wien) III/2, Hansalgasse 3.

El Bohemujo kaj Moravujo.

— **La gazetistaro.** El letero de kunlaboranto ni citas:

En la nuna jaro de »*Zájmy Lidu*« (eliranta en Brno, ĉefurbo de Moravujo, — germane: Brünn) troviĝas en la numeroj 3-a, 6-a, 7-a, 9-a kaj 20-a artikolo pri Esperanto, skribita de s-ro Ĉejka. En la n-ro 20-a komencas esperantaj ekzercoj por komencantoj. Ĉion pri E. el »*Zájmy Lidu*« denove presas »*Čtení Besední*«, gazeto direktata de la sama redakcio.

»*Národní Politika*« (eliranta en Prago), la 12-an de majo skribas, ke laŭ broŝuro eldonita de s-ro Schleyer estas D-ro Zamenhof »fuŝisto, ĉar li konstruis E.-on laŭ volapük (!) — sen permeso de s-ro Schleyer«. Plu ni sciigas, ke volapük estas simpla kaj E. tro komplika, ke la nombro da membroj estas nur »moderna reklamo«, kaj ke en volapük oni presas 7 gazetojn, la ĉefan en Graz (Stirujo).

»*Právo Lidu*« la 3-an de aprilo 1901 ree parolis pri Esperanto. Malkonsilas al laboristoj lerni E., ĉar pro manko de poeta kaj scienca literaturo ĝi estas por ili senutila, escepte en internaciaj kongresoj de laboristoj — se ĝin lernus ankaŭ iliaj alilandaj kolegoj. Provizore sufiĉas, se E.-on lernus nur agitatoroj kaj ĵurnalistoj devigataj al internacia komunikado. Je tiu artikolo serioze respondis en la sama gazeto, la 22-an de aprilo, s-ro V. Kovanda (laboristo). Esperanto estus por laboristoj utila eĉ sen literaturo. Sed ĝi posedos literaturon; la literaturoj luza (*lusaciĝi*), baska, provenĉala, armena elkreskis ankaŭ el malgrandaj

komencoj! Ni ne devas nur atendi, sed vastigi Esperanton en la tutan popolon.

Studenta gazeto »*Studentský Sborník*« (en Prago eliranta) en sia 4-a numero skribas, ke ĝia redakcio uzas en postlima korespondado ankaŭ la limon E., kaj en ĝia 6-a numero estas publikigita artikolo pri la movado de la rusa studentaro kun rimarko, ke ĝi estas traduko de Esperanta originalo al ili sendita de rusa studento.

La redakcio de »*Nový Kult*« en la 4-a numero promesas argumenti sian simpatian al E., kaj tuj publikigas en E. la sekvantan tekston: »Nia redakcio estas kompleza liveri al ĉiuj alilandaj esperantistoj la informojn pri ĉiuj aferoj bohemiaj, precipe artistaj kaj socialistaj. Ankaŭ oni elŝanĝas la objektojn artistajn (ekzemple eks-libris, afiŝojn, poŝtkartojn) kaj aliajn objektojn de kolektista plaĉo.« Adreso de l' redaktoro: »St. K. Neumann, redaktoro de *Nový Kult*, en Prag, Olšany, 45 (Bohemujo).«

Gazeto »*XX. věk*« skribas en sia 1-a numero, ke E. por internacia komunikado estas necesega; sur la kovrilo de numero 3-a ĝi ree parolas pri E., kaj sur la kovrilo de la 4-a, 5-a kaj 6-a numeroj komencas la redaktoro mem skribi mallongajn ekzercojn en E.

S-ro K. Pelant aranĝas kurson Esperantan por laboristoj en Brno, pri kiu ni alifoje pli parolos.

J. Holub.

*

— **Propagandan folieton** en ĉeĥa lingvo presigis kaj disdonis s-ro T. Ĉejka.

*

— **La lernolibro bohema.** Unu el niaj malnovaj amikoj en Aŭstrujo komunikis al nia libera dispono la sekvantajn opiniojn, kiujn ni kun plezuro publikigas kiel sendube bonvenajn al la eldonintoj mem:

„Jam ĉe la ricevo surprizas nin agrable la bela eksterajo kaj la amplekso de la libro.

Kiel tre praktika por la komencantoj oni devas konstati la ĉeestadon da multaj, nece-

saj kaj utilaj ekzercaĵoj, komencantaj per la plej simplaj tezoj, grandigantaj sisteme ĝis fluanta teksto de la fabeloj kaj klasike perfektaj artikoloj; oni trovas en la lernolibro ankaŭ bonajn modelojn por la parolado kaj leteroj, fine — kio ankaŭ grava — la necesajn pli *grandajn* vortarojn, — tio ĉio unuigita en unu fasko.

La modela kaj zorgema aranĝado faciligas eksterordinare la lernadon de Esperanto, kondukante la komencanton de la facila komenco, — preskaŭ nerimarkeble kaj senpene — ĝis perfekta lerteco en la lingvo, tiel, ke la lernanto nepre bezonas neniajn buŝajn klarigojn de ia instruanto, kion mi ĵus povas konstati el propra sperto, havante okazon observi la bonajn sukcesojn de du ĉarmaj lernantinoj, kiuj havinte kvazaŭ timeton kaj dubojn antaŭ la lernado, nun ludeme *sin amuzas per la studio*.

Kvankam mi ne sentas min kompetenta por povi ankaŭ plibonigi en io la estimindajn aŭtorojn, mi do, — sed nur laŭ ilia propra deziro elparolita en la fino de la libro, — permesas al mi avizi kelkajn malgrandajn kaj tute modestajn rimarkojn, tuŝantajn la mnemoteknikan parton de la gramatiko, kio, laŭ mia opinio, povus esti eventuale uzata en la venonta eldono.

La lingvo bohema havas multajn similaĵojn gramatikajn kun Esperanto kaj se oni atentigas je ili, la lernanto tuj facilege kaj bone ekmemoras la regulojn gramatikajn.

Por ekzemplo: Sur 8. paĝo oni povus diri ĉe 1) Nedifina artikolo ne ekzistas, egale, kiel en la lingvo bohema oni ĝin ne uzas.

ĉe 2) La substantivo havas ĉiam la finaĵon *o*, kiel ankaŭ kelkaj bohemaj substantivoj, ekz. *zlato*, *jablko*, *pismo*, *bláto* = oro, pomo, skribo k. t. p.

Substantivoj femininaj (de virina gento) ekprenas, kiel kelkaj germanaj, al sia radiko *in*, ekz. amiko (= *prítel*, *Freund*) — amikino

(= *prítelkyně*, *Freundin*); mastro (= *hospodár*, *Wirt*) — mastrino (= *hospodyně*, *Wirtin*).

ĉe 3) Adjektivo finas ĉiam per *a*, kiel bohemaj adjektivoj virinaj, ekz. *černá tabule* = nigra tablo, *dobrá matka* = bona patrino, *bílá stěna* = blanka muro.

ĉe 6) La verbo. a) La infinitivo finas ĉiam, kiel en la lingvo bohema, per *i*: plugi = *psáti* k. t. p.

ĉe 7) La adverbo finiĝas kun *e*, simile kiel en la lingvo bohema: brilante = *skvěle*, bele = *pěkně*, skribe = *písemně*.

Per la avizo je tiuj ĉi parencaj similaĵoj la lernanto pli rapide ekmemoras la regulojn gramatikajn.

Estus bone, se oni, antaŭ la verkado de ia nova eldono de la lernolibroj, studius iom la konataj modeloj de jam ekzistantaj bonegaj lernolibroj por aliaj nacioj.“

El Belgujo.

— **Malferma letero al s-ro Jan Van Ryswyck, urbestro de Anverso, pri la lingvo helpanta internacia.** S-ro kapitano Charles Lemaire en Bruselo presigis en la n-ro 153 de la gazeto »*Le Petit Bleu*«, la 2-an de junio, malferman leteron, adresitan al urbestro Van R., pri lingvo internacia. La letero estas longa, okupanta ĉirkaŭe kvin grandajn kolonojn de l' gazeto, kaj verkita kun talento kaj viveco.

S-ro Van Ryswyck estis adresinta leteron al s-ro Vernon, profesoro kaj tradukisto de multaj lingvoj eŭropaj, kaj permesis al tiu publikigi la leteron, kiu traktis la demandon, tiumomente tre priparolatan en Anverso, pri lingvo internacia.

»Mi pensas ke lingvo universala estas utopio.« Tiel komencas la letero de s-ro Van R.

S-ro Karlo Lemaire tial montras per ekzemploj, kio estas ordinare la tielnomataj »utopioj«; kio estas lingvo internacia aŭ »uni-

versala«, kaj ankaŭ kio estas Esperanto, kaj kiamaniere multaj eminentaj homoj kaj societoj ŝatas tiun lingvon.

Sendube la respondo publika de nia eminenta samideano estas bona parolo en bona tempo.

El Brazilujo.

— Pri la brazila propagando skribas al ni nia amiko s-ro A. Caetano Coutinho:

La gazeto »*Araguary*«, n-ro 289, de 23. februaro 1901, donis informojn pri la ekzistado de Esperanto; montris ĝian utilecon, por la rilatoj internaciaj: citis opiniojn de eminentuloj, enhavitajn en la propagandaj broŝuroj.

La gazeto de urbo Juiz de Fôra, »*O Pobre*«, en la n-ro 24, de 20. februaro 1901, donas sciigeton pri nia lingvo kaj pri la lernolibro.

— La gazeto »*O Municipio*« de urbo S. Joao da Barra, en la n-ro 145, de 19. majo 1901, presis bonan artikoleon, rilate al facileco de la reguloj gramatikaj kaj vortaro de Esperanto, kaj al ĝia indaĵo por korespondado, al tiaj personoj kiuj ne konas fremdajn lingvojn.

Ĉiuj la tri gazetoj, al kies redakcioj s-ro A. C. C. sendis librojn pri Esperanto, presis lian adreson, aldonante ke li estas preta ĉiam doni informojn pri Esperanto.

El Bulgarujo.

— **Literaturo.** Antaŭ kelke da tempo s-ro Svetoslav Iv. Manev en Ĵeravna (Bulgarujo) sendis al ni bulgaran verkon, kies titola paĝo enhavas la sekvantan, se oni tradukas ĝin Esperante: »Biblioteko »*Espero*« N^o 1. *El la Esperanta literaturo.* Tradukitaj rakontoj kune kun kelkaj vortoj pri la lingvo internacia Esperanto kaj ĝia gramatiko. Redaktinto Svetoslav Iv. Manev. Sliven — Presejo »*Trud*« — 1900.« Prezo 60 centimoj.

La 20 unuaj paĝoj traktas la Esperantan lingvon kaj ĝian gramatikon, la ceteraj el la

63 paĝoj enhavas tradukojn de rakontoj presitaj en nia gazeto.

Ni, kompreneble, ne povas doni ian ajn prijuĝon pri la literatura indo de la verko, ĉar ni ne komprenas la bulgaran lingvon.

Sendube la aŭtoro intencas daŭrigi la eldonon de similaj tradukoj, ĉar li presigis supre sur la titola paĝo la vortojn: »Biblioteko »*Espero*« N^o 1.«

Ni demandas, ĉu ne estus pli preferinde elekti alian nomon ol »*Espero*«, kio ja estas jam la nomo de la rusa societo esperantista; se oni donas al ĉiuj objektoj unu saman nomon, tiam la nomo perdas sian celon de distingo.

El Francujo.

D-ro Krikortz lasis nin vidi n-ro 4 (aprilo 1901) de l' gazeto medicina »*Les Nouvelles Médicales*«, en kiu lia kolego d-ro Foveau de Courmelles prezentis Esperanton al siaj francaj samprofesianoj per dupaĝa artikolo, kiu bone montras la utilon kaj preferindecon de internacia lingvo por la uzo de l' kuracistoj.

*

— En »*Courrier de La Rochelle*« n-ro 40 (19. majo) sin trovas la anekdoto »punita fiereco« el n-ro 12. 1900 de L. I. france enpresita de s-ro S. Meyer, kun la noto ke ĝi estas tradukita el Esperanto.

*

— **La nelacigebla kaj lerta propagando** de l' profesoro de universitato s-ro Ch. Méray en Dijono prenas al si ĉiam novajn esprimojn por konigi al la sciencularo nian lingvon.

Antaŭ kelka tempo ni ricevis senditan de li apartan presajon de granda (46-paĝa) artikolo enpresita en »*L' Enseignement Mathématique*«, n-ro I, 1901. Ĝi portas la rubrikon »korespondaĵoj internaciaj en Esperanto« kaj estas detala rakonto pri la ĉefa enhavo, france

tradukita, de la leteroj, kiujn la verkinto ricevis de esperantistoj el la tuta mondo, kune kun la komentarioj kiujn la enhavo de la apartaj leteroj inspiris al la profesoro.

Ni citas la lastajn vortojn de l' artikolo, kiuj diras:

»Kaj mi finigas aldonante por mia propra kalkulo, ke la modernaj homoj estos donintaj la demonstracion plej certan je sia konfuza maldiligenteco, je sia sklaveco rilate al la antaŭjuĝoj, — kvankam ili kredas esti forskuintaj de si la lastan el ĉiaj antaŭjuĝoj, — je sia kruda malestimo por ĉio, kio ne estas mono kontanta, se ili longtempe rifuzas profitigi al si ilon, kiun ili nur havas la penon preni por tiri el ĝi moralan bonon nekalkuleblan, materialajn profitojn, kies sumo por la homaro sin ciferas certe per dudekoj de miliardoj.«

*

Alia artikolo, rubrikita »Esperanto, lingvo helpa internacia«, estis presita, la 1-an de majo en »*L' Enseignement Chrétien*«. Per tiu ĉi artikolo, kiu okupas 10 paĝojn, s-ro Méray en la komenco informas, kio estas Esperanto, ke ĝi estas facile lernebla kaj posedas multajn aliajn laŭdindajn ecojn. Sian opinion li pravas per faktoj. Ni ne povas rifuzi al ni la plezuron citi el tio, kion li skribas, la sekvantan:

»Ekkoninte en februaro 1900 la ekziston de Esperanto per la rakonto pri parolado kiun faris en la universitato« (en Dijono) »s-ro Lambert, mia kolego de filologio, mi ekhavis la scivolon rigardi, en kio ĝi povus konsisti, scivolon tute skeptikan, ĉar mi estis kaptita en la antaŭjuĝoj, ke la problemo de lingvo internacia estas tiel same nesolvebla kiel la problemo de ia movataĵo eterna — de *perpetuum mobile*. Tamen tri aŭ kvar tagoj da ekzameno sufiĉis por naski en mi la konvinkon, kiu inspiris al mi tiujn ĉi liniojn, kaj mi daŭrigis tiun studion tiel facilan, post mia aliĝo al la S. p. p. Esp.

Mi konis baldaŭ la absolute seriozan karakteron de tiu Societo, la scion, la lertecon, la sindonecon, la perfektan honorindecon de ĝiaj ĉefaj kondukantoj; mi havas sekve la plej plenan konfidon je la preciza korekteco de tio, kion ili raportas kaj je la sincereco de tio, kion ili diras. Sed, mi tion ripetis, mi volis edifiĝi *per mi mem*, por finprovi mian konvinkon, por ke mi ne estu subtrompita per ia iluzio, por pli bone esti kapabla kunapartenigi tiun mian konvinkon al aliaj homoj. Tial, farinte min preskaŭ posedanta la lingvon (trideko da horoj en tri semajnoj sufiĉis al mi por tio), mi komencis, en ĝi kaj per ĝi, ekzamenadon en ĉiuj landoj, kie la lingvo franca ne estas paroladata. Jen, post la fino de naŭ monatoj, mi prezentas la entrovajon de tiu korespondo, tuta en Esperanto.«

Post tio sekvas la nomoj kaj adresoj de liaj korespondantoj, en la nombro de 54, kaj la detalaj nombroj de ĉies korespondadoj, kune 135.

La dua sekvanta parto pravas per eltiroj el la leteroj de multaj personoj la grandan facilan lerneblecon de Esperanto, kaj la cititaj faktoj estas tute konvinkigaj.

La tria parto montras, per la helpo de la sama materialo, la korespondadoj, la jam grandan disvastigitecon de Esperanto, unuparte konstatitan per la ekzistado kaj diversdeveno de tiuj korespondadoj mem, aliparte atestitan per la sciigoj donitaj en la leteroj pri la ofte multampleksa Esperanta korespondado de la apartaj skribintoj.

Laŭ ĉio, kion li scias pri tiu ĉi objekto, s-ro M., la matematikisto, supozas, ke la ĉiutaga cirkulado de korespondadoj en Esperanto nun kalkuliĝas je unu milo, eble, por la tutkuno de la civilizitaj landoj, kaj je unu aŭ kelkaj dekoj por la sola urbo Dijono.

La parolado de Esperanto estas ankaŭ traktata en speciala paragrafo, kiu donas kelkajn ekzemplojn, sufiĉe konvinkigajn por la dubanta publiko.

Ankaŭ per klaraj faktoj s-ro M. kontraŭargumentas la ordinaran malmultekoste akiritan opinion ĉe la indifera aŭ skeptika publiko, ke la arta lingvo, verko de unu sola homo, ne permesus esprimi aliajn aferojn ol ideojn tute nekomplikitajn kaj limigitajn. La detaloj de la korespondadoj pravas la kontraŭan de tiu opinio.

Alia ĉapitro ankoraŭ donas ekzemplojn je la praktika utilo, kiun Esperanto donas jam, malgraŭ ĝia ĝisnuna kompare negranda disvastigiteco.

Post tre interesa raporto pri la Esperantista agado en Dijono kaj la belaj fruktoj de tiu eminenta agado de homoj sociale tutsideblaj kaj influaj, kiun oni devas admiradi, la aŭtoro finigas sian artikolon per informoj pri la rimedoj por lerni nian lingvon kaj eniri en komunikon kun la esperantistoj.

Ankaŭ la gazeto »L. I.« estas de li rekomendata.

*

— La tuta urbo DIJONO per oficiala decido de sia urba estraro aliĝis al la S. p. p. Esperanto kiel membro.

*

— La Delegacio por lingvo helpa internacia. Ni parolis diversajn fojojn jam pri »la propono de s-ro Leau«. La propono kreskis kaj viriĝis: ĝi nuntempe jam estas atentinda agado.

Per la iniciativo de s-ro Leau, dum la ekspozicio en Parizo 1900, kvin diversaj scien-

caj kongresoj elektis delegatojn kun la komisio esplori la demandon de lingvo internacia. Tiuj delegatoj la 17-an de januaro lasta organizis sin »*la Delegacio por la enkonduko de helpanta lingvo internacia*« kaj decidis aliĝi al si aliajn elektotajn por la sama celo delegatojn de ĉiuj sciencaj, komercaj kaj turistaj societoj kiuj volus tiajn elekti. Samtempe ili konfirmis la planon de sia laborado; ĝia enhavo estas la sekvanta:

DEKLARACIO.

La subskribitoj, delegitaj de diversaj Kongresoj aŭ Societoj por esplori la demandon pri helpanta lingvo internacia, interkonsentis pri la punktoj sekvantaj:

1-a. Estas dezirinde ke oni sin okupu je la elekto kaj la disvastigo de l' uzado de helpanta lingvo internacia, difinita, ne por anstataŭi en la individua vivo de ĉia popolo la naciajn idiomojn, sed por servi al la interrilatoj skribaj kaj parolaj inter personoj havantaj malsamajn lingvojn.

2-a. Helpanta lingvo internacia devas, por plenumi kun utileco sian rolon, kontentigi la sekvantajn kondiĉojn.

1-a K o n d i ĉ o. Esti kapabla servi al la ordinara interrilatoj de la vivo societa, al la interŝanĝoj komercaj kaj al la raportoj komercaj kaj filozofiaj.

2-a K o n d i ĉ o. Esti facile akirebla al ĉiu persono ricevinta mezan elementan instruadon kaj speciale al la personoj de civilizacio eŭropa.

3-a K o n d i ĉ o. Ne esti unu el la lingvoj naciaj.

3-a. Estus bone organizi ĝeneralan Delegacion reprezentantan la ĉiujajn de la personoj kiuj komprenas la neceson kiel ankaŭ la eblecon de helpanta lingvo kaj estas interesitaj je ĝia uzado. Tiu Delegacio elektos Komitaton konsistantan el membroj povantaj kunigi dum kelka tempo.

La rolo de tiu Komitato estas difinita en la sekvantaj artikoloj.

4-a. La elekto de la helpanta lingvo apartenas unue al la Asocio internacia de l' Akademioj, poste, en la okazo de malsukceso, al la Komitato preparolita en la artikolo 3-a.

5-a. Sekve, la Komitato havos, kiel unuan mision la rolon prezenti laŭ la modo postulata al la Asocio internacia de l' Akademioj, la voĉdone esprimitajn dezirojn de la Societoj kaj kongresoj aliĝintaj, kaj peti ĝin respektive ke ĝi efektive la projekton por helpanta lingvo.

6-a. La Komitato devos krei propagandan Societon difinitan por vastigi la uzadon de la helpanta lingvo kiu estos elektita.

7-a. La subskribitoj, nun delegitaj de diversaj Kongresoj kaj Societoj, decidas klopodi en ĉiuj Societoj sciencaj, komercaj kaj turistaj, por akiri ilian aliĝon al tiu ĉi projekto.

8-a. Estos akceptitaj por partopreni en la Delegacio la reprezentantoj de la regule fonditaj Societoj kiuj estos aliĝintaj al tiu ĉi Deklaracio.

La nombro de la delegatoj jam kreskis tiel, ke la Delegacio nun havas 51 membrojn, kiuj reprezentas 34 societojn kaj kongresojn.

Tiuj, kiuj volas ricevi pli detalajn informojn kaj helpi al la agado por la tre rekomendinda celo de la Delegacio, turnu sin al: la sekretario s-ro L. Leau. 54, Rue Saint-Placide. *Paris* (VI^{me}).

*

— »*Por la lingvo internacia*« estas la titolo de broŝuro verkita france de d-ro *Louis Couturat*, profesoro de l' universitato en Toulouse, delegato de la Kongreso internacia de filozofio (1900). Tiu broŝuro en klaraj trajtoj raportas pri la nuna stato de la demando pri lingvo internacia, traktas la neceson kaj eblon de tia lingvo kaj kondukas en lerta, inteligenta kaj interesa maniero la legantojn al Esperanto kiel la solvo de la problemo. Ni varme rekomendas tiun broŝuron, kiu estas akirebla ĉe la aŭtoro, s-ro Couturat, en: 7, rue Nicole. Paris (VI^{me}); — ĝia kosto: 1 ekz. 0,15 fr., 10 ekz. 1 fr., 100 ekz. 7,50 fr. (ĉio afrankite).

Oni sciigis al ni, ke tiu broŝuro estos baldaŭ tradukita en la lingvoj angla, germana kaj rusa.

*

— *Fremdkursoj ĉe la Universitato de Grenoble*. Ni ricevis la sekvantan leteron, kiun ni kun plezuro komunikigas al niaj legantoj:

UNIVERSITATO DE GRENOBLO.

La 3-an de julio 1901.

Estimata Sinjoro,

Mi havas la honoron sciigi vin, ke la Universitato de Grenoble estas kreinta ĉe sia Literatura Fakultato kursojn ĉiujarajn pri la Lingvo kaj Literaturo Francaj por la uzo de la fremdaj studentoj.

Krom tio ekzistas ĉe la nomita Universitato, dum kvar monatoj, de 1-a de julio ĝis 1-a de novembro, kursoj dirataj »*Cours de Vacances*« kiuj estis ekvataj la lastan jaron (1900) de ĉirkaŭ ducent aŭdantoj, el kiuj la plejmulto estis profesoroj, instruistoj, aŭ lernantoj en sia lando.

La Studentoj Esperantistaj povas esti certaj, ke ili trovos ĉe Grenoblo la plej simpatian akcepton.

E. Boirac

Rektoro de l' Universitato Grenobla.

Por ĉiuj informoj, skribu Vi al Sinjoro *Marcel Reymond*, prezidanto de la Mastra Komitato de la Fremdaj Studentoj, 4, Placo de la Konstitucio, Grenoblo (Isero). Francujo.

Laŭ la prospektoj la instruado estas praktike aranĝita por la fremduloj dezirantaj perfektigi siajn sciojn en la franca lingvo; krom tio la estado en Grenoblo kaj de la partopreno en la kursoj estas malmultekostaj. Oni ankaŭ ne forgesu ke tiu regiono meze en la montoj, proksime al *Mont-Blanc*, estas unu el la plej ĉarmaj.

El Germanujo.

— La presista gazeto »*Allgemeiner Anzeiger für Druckereien*« (Universala Sciigo por Presejoj), eliranta en Frankfurt a. M., en n-ro 27 (4. julio) publikigas Parizan Leteron de s-ro V. Breton (presisto), parolantan pri la Kongreso de l' francaj presejestroj aranĝota post mallonga tempo en Dijono. En tiu ĉi letero la skribinto diras interalie, ke en la dirita kongreso oni parolos pri la graveco de la lingvo Esperanto, kiu estas elpensita de la rusa doktoro Zamenhof (preserare »Lomenhof« estis kompostita en la gazeto), kaj kiu devas anstataŭi la nesukcesintan lingvon volapük.

El Grand-Britanujo.

— Skotlanda gazeto, »*The People's Friend*«, eldonata en urbo Dundee, informis, la 22-an de aprilo lasta, siajn legantojn pri Esperanto per artikolo sufiĉe longa kaj treege bona kaj interesodone verkita de s-ro Josefo Rhodes, redaktoro de la dirita gazeto kaj fervora esperantisto.

Priparolinte la faktoj historiaj kaj esencaj de la demando, la verkinto finigas sian artikolon tiamaniere:

»En tiuj ĉi insuloj ni estas malrapidaj por akcepti novajn ideojn, kaj pro tio la aliĝintoj ĉi-tieaj de Esperanto preskaŭ povus esti kalkulataj sur la fingroj de homo; sed certe estus strange se, dume esperadante ke la lingvo de Shakespeare kaj de Burns fariĝu iam universala, ni por longa tempo malŝatus tiel facila ĉeestanta rimedo de internacia elŝanĝado de pensoj, kaj — ĉu ne estas esperinda ankaŭ tio — tiel valora agento por la akcelo de pli bonaj sentoj inter grandaj popoloj kies bedaŭrindaj malkomprenecoj tro ofte devenas de reciproka nekonado de iliaj pensoj kaj gustoj, unuj de la aliaj. Efektive la granda celo de D-ro Zamenhof estis: akceli internacian amon, kaj en tia penado li devas ricevi ĉian kuraĝigon.«

El Holando.

— S-ro Dreves Uitterdyck, fervora amiko de nia lingvo, sciigas nin ke li intencas verki kaj eldoni lernolibron Esperantan por holandanoj. Tre utila kaj necesa estas tiu ĉi ago de nia amiko, ĉar nia afero en Holando estas preskaŭ tute nekonata.

El Hungarujo.

— »*Tradukis el Esperanto*« estas ne malbona noteto, apud la rakontoj en naciaj gazetoj — tiom pli, se la rakontoj estas interesaj kaj tre legindaj.

La belega idilio de Iv. Ev. Gešev »*La malŝlosilo*«, tradukita el la bulgara lingvo de C. R. por »L. I.« estis enpresita en la n-ro 23 de »*Tolnamegyei Közlöny*« en hungara traduko de Paul de Lengyel sub la rubriko »*Négylevelű löhere*« (= kvarfolia trifolio).

De tiu sama tradukinto sin trovis en la n-ro 24 de la dirita gazeto la versaĵo en prozo de Turgenjev »*Rozo*«, — kaj en la n-ro 28 la rakonto »*Ordeno*«.

Post ĉiu traduko estas presita, ke ĝi estas tradukita el Esperanto.

El Japanujo.

— El la letero de s-ro F. Postnikov, pri kiu ni parolas sub la rubriko »El Rusujo« de tiu ĉi n-ro, ni citas tie ĉi la sekvantan:

»Post klopodoj prosperis al mi trovi japanon, kiu konsentis traduki malgrandan rusa-esperantan lernolibron en la lingvon japanan. Dum la tradukado montriĝis, ke traduki alfabeton kaj transdoni ĉiujn gramatikajn regulojn en japana lingvo ne estas tiel facile, kiel traduki ilin en ian ajn lingvon eŭropan. Sed ni esperas iom post iom venki ĉiujn barojn.«

El Rusujo.

— »*Minskij Listok*«, rusa gazeto en urbo Minsk, enhavis en n-ro 71 (17/30. de junio) la rusan tradukon de la rakonto »La malŝlosilo« el »L. I.«, akompanantan de artikolo pri Esperanto. S-ro Lojko estis la verkinto de tio.

*

— En la malgrandrusa ĵurnalo »*Lim.-Nauk. Vistnik*«, eldonata en Lwów (= Lemberg) en Galicio, estis presita en n-ro 4 de tiu ĉi jaro tri versaĵoj de la popola malgrandrusa poeto Ŝevĉenko en la lingvo Esperanto. Tiuj ĉi versoj estis transpresitaj el la gazeto »L. I.«, n-roj 6 kaj 7 de 1900. En la fino en rimarko estis dirita, ke la traduko estas bonsona kaj ke Esperanto estas tre facile legebla lingvo.

*

— S-ro N. Studenov faris al ni la komplezon transsendi la n-ron 130 (22. V. 1901) de la rusa gazeto »*Bessarabano*«, en kiu estas presita artikolo pri nia lingvo; nome, oni publikigas en la gazeto pri la raporto de s-ro Sebert al la franca Akademio de Sciencoj, kaj pri la malfermo de Esperantaj kursoj en la Touring-Club.

*

— **Esperantista vojaĝeto.** — Dezirante ripoziĝi du aŭ tri printempajn tagojn, ekster la fumeganta ĉefurbo en pli pura aero, mi for-

veturis Narva'n * kie estas malgranda (ĉirkaŭ 20 personoj) rondeto de esperantistoj.

En Narva mi havis persone neniun konaton, sed mi korespondadis kun kvar tieaj esperantistoj kaj interŝanĝis kun ili je fotografajoj.

Narvaj esperantistoj s-roj Tenison, Hoflerg kaj Vildenaŭ renkontis min kiel jam longe kaj bonege konatan amikon, kiun ili sole ne vidis kelke da tempo kaj regalis min kiel amatan fraton. Dank' al ili mi konatiĝis kun aliaj Narvaj esperantistoj s-roj Valfrid, Sjellik, Lisman kaj Anilin, kaj en ilia kompanio, anstataŭ du mi restadis en Narva kvin tagojn (de 7/20. ĝis 12/25. de majo) kaj konatiĝis kun la Narvaj rimarkindaĵoj: belaj falakvoj sur la rivero Nazova, teksaj fabrikoj, monumentoj k. t. p. kaj forveturis hejmen ravigita je la gastamo de l' Narvaj esperantistoj.

Kvankam tiu ĉi malgranda noteto pri mia vojaĝeto havas tre malgrandan intereson por la legantoj, sed ĝi argumentas ke nia kara lingvo internacia Esperanto proksimiĝas ne sole kun alilandujanoj, sed ankaŭ kun sampatrujanoj. V. Kurmanajev, kasisto de la societo *Espero*.

*

— **El Vladivostok** skribis al ni s-ro V. Petrovski la sekvantan:

»Volu presi en la »Lingvo Internacia« ke la 12/25-an de marto 1901 sinjoro Postnikov parolis pri Esperanto en la Vladivostoka Muzeo de la Societo de Ellernado de Amura Landoj. 90 personoj apudestis. La antaŭlego havis videblan sukceson.

Baldaŭ ni esperas formi Esperantajn kursojn en Vladivostok. Sed en nuna tempo nia propagando ne estas tre sukcesa en nia lando. Ni ne havas da liganoj en la gazetistaro kaj la plej granda gazeto en Vladivostok »*Vostoĉnij Vjestnik*« (Orienta Kurjero) stariĝis kontraŭ ni kiel malamiko.«

* Urbeto je 160 kilometroj de S.-Peterburgo.

Iom pli malfrue ankaŭ s-ro F. Postnikov skribis al ni el Vladivostok pli longan leteron. Li sendis al ni 5 rublojn kiel monoferon por la plibonigo de l' fondkapitalo de nia gazeto. Kora danko! — El la letero ni citas:

La Vladivostokaj esperantistoj jam ricevis de l' komitato de la societo »Espero« la konsenton malfermi ĝian filion en Vladivostok kaj nun klopodas ĉe la guberniestro pri oficiala malfermo de ĝia agado. La iniciatoroj de l' ĉi-tiea Esperanta societo estas: s-roj N. A. Palčevskij (vice-prezidanto de l' Vladivostoka apartaĵo de la Rusa Geografia Societo), V. I. Paĥitonov (ĥemiista kandidato de l' peterburga universitato), V. J. Petrovskij (milita inĝeniero-kapitano), F. A. Postnikov (milita mara inĝeniero-kapitano), N. M. Solovjev (pli alta kontrolisto de l' regnaj konstruaĵoj).

Unu el la Vladivostokaj esperantistoj kolorigis la flankan muron de sia domo je blanka kaj metis en la mezo de tiu ĉi blanka muro grandan, kvinpintan verdan Esperantan stelon. Tiun ĉi stelon oni povas vidi preskaŭ de unu kilometro.

En enlandaj gazetoj estis publikigitaj kelkaj anoncoj pri vendado de lernolibroj en la Vladivostoka librovendejo de Suŝĉinskij & K^o.

En la gazeto »*Vostoĉnij Vjestnik*« estis presita malsaĝa rimarko pri nova malfermota esperanta societo. La titolo de artikolo: »Nova embrio«. — En la sekvinta numero estis lokigitaj eltiroj el privata letero, reparolanta pri tiu ĉi artikolo kun sufiĉe longaj klarigoj de la redakcio. Poste en tri gazetoj (*Dalnij Vostok*, *Vladivostok* kaj *Vostoĉnij Vjestnik*) estis presitaj en la »Kroniko« anoncoj pri la publika parolado de inĝeniero F. Postnikov pri la lingvo Esperanto kaj post kelkaj tagoj aperigis bonan artikolon pri tiu ĉi parolado, skribitan de s-ro Solovjev.

Malgranda rondeto de Vladivostokaj esperantistoj kolektiĝas preskaŭ ĉiudimanĉe jen ĉe unu, jen ĉe alia esperantantisto, vespere post la 6-a horo kaj ĝis la 12-a ili parolas, disputas kaj legas fragmentojn el »Lingvo Internacia« kaj »L' Espérantiste«, — ili trinkas teon, dume rakontas anekdotojn.

El Svedujo.

— **Publika parolado pri Esperanto en Strengnäs.** El letero de la estiminda sam-

ideano fr-ino Hilda Cederblad, ni citas la sekvantan rakonton:

»Vi povas imagi al vi mian surprizon, kiam en la komenco de marto mi ekvidis en gazeto, ke la »Mondlingvoj Volapük kaj Esperanto« estos la objekto de unu el la kutimaj paroladoj en nia najbara urbo! Komprenoble mi deziris ĝin aŭdi — mi kiu ankoraŭ neniam ekhavis la plezuron rekonti ian »samideanon«. La glacioj de la lago Mälär estis nesurireblaj kaj ĉiaj malhelpaĵoj intervenis, sed vi scias ja ke »kion volas virino, tion Dio volas«, kaj sekve je la difinita horo mia bofratino kaj mi estis sidantaj en la salono, kie havos lokon la parolado, kaj rigardadis per edife atentaj okuloj la grandan nigran tabulon, sur kiu la antaŭhistorio kaj elvolviĝado de la lingvoj internaciaj estis legataj en siaj grandaj trajtoj kaj tute konvene finiĝis per Volapük kaj nia propra kara lingvo.

Mi sidis tie en streĉa atendo, ĉar restis ja al mi tiom multe por lerni pri la Esperanta elparolo k. t. p. — kaj tiam, ĉu vi povas pensi kio okazis? — Ho, s-ro S., la parolanto, neniam atingis Esperanton, sed tiu ĉi parto devis esti prokrastita ĝis la sekvinta fojo. Ĉu vi povas imagi al vi similan ironion de la sorto, ke mi alvenas al Strengnäs por aŭdi paroladon pri — Volapük! KREDU, ke mi sidis furioza, sed, kiel ajn estis, fine ĉio turnis sin en la plej bonan, ĉar ĉe la interprezento poste, montriĝis ke s-ro S. estis eks-volapükisto kaj konis nur tre malmulte Esperanton. Mi havis tial okazon sendi al li diversan literaturon Esperantan por »fontaj studioj«, kaj laŭ tio, kion mi aŭdis, oni diras ke la sekvinta lia parolado estis treege interesa. Ĉu li sukcesis fari ian propagandon, tion mi ne scias.«

Poste ni ricevis, senditan bonvole de fr-ino C., la n-ron 30 de »*Strengnäs Tidning*«, de la 12-a de aprilo, kiu donas duonkolonan rakonton pri la dirita dua parolado de s-ro Säterstrand. La gazeto parolas tre simpatie

pri Esperanto kaj citas la laŭdajn prijuĝojn kiujn esprimis s-ro S. en sia parolado, kiu traktis ne sole la historion de Esperanto, sed ankaŭ la detalojn de ĝia gramatiko. Ankaŭ li antaŭlegis al la aŭdantaro modelojn el la literaturo kun klarigoj por la kompreno, interalie la poemon de Nikander »Vespero«.

*

— **Plena simpatio.** En la sama tago, kiam la »Právo Lidu« en Prago (s-ro T. Čejka bonvole sendis al ni la numeron) enhavis artikolon pri nia lingvo, scie la 12-an de aprilo, la sveda samidea kun ĝi gazeto ĉiutaga »*Social-Demokraten*« n-ro 84 parolis en treege simpatia artikolo pri la bonaj ecoj kaj granda utilo de Esperanto, speciale por la organizitaj laboristoj de ĉiuj landoj. Por apogi sian opinion la verkinto konigas la legantojn de *S.-D.* kun la Esperanta propagando en Bohemujo kaj Moravujo kaj citas el L. I. n-ro 1 de 1901 la tie legatajn vortojn de s-ro Pelant.

*

— »**Tradukis el Esperanto.**« Tiu sama bela rakonto — »La malŝlosilo« — kiu estis legata en »Tolnamegyei Közlöny«, estis ankaŭ tradukita svede por la gazeto »*Vårt Land*« kaj enpresita en la n-ro 102 de ĝia ĉiutaga eldono kaj en la n-ro 17 de ĝia ĉiusemajna eldono.

— En n-ro 76 (ĉiusemajna, n-ro 12) de tiu sama sveda gazeto »*V. L.*« estis presita svede la rakonto »La pluvo« el L. I. n-ro 60.

*

— **La Klubo Esperantista en Stokholmo** multnombre kunvenis la 26-an de aprilo lasta en la klubejo de la societo »Studentoj kaj laboristoj.« La vic-klubestro s-ro C. E. Carlsson prezidis. Oni konfirmis novan regularon por la klubo, similan al la regularo de S. p. p. Esperanto en Francujo. La prezidanto antaŭlegis leteron de la Grupo Diĵona, kiu sendis sian saluton kaŭze de sia centnombro da membroj. S-ro V. Langlet rakontis en Esperanta lingvo pri la sorto de du rusaj esperantistoj el lia konataro. La longa, viva kaj treege interesa parolado estis akceptita kun aplaŭdoj.

La 22-an de majo la Klubo havis sian lastan kunvenon antaŭ la somera sezono. La

plej grava kaj la plej priparolita demando de tiu ĉi kunveno estis la propagandaj manieroj kaj rimedoj de la Klubo. Speciale estis priparolata la agado de s-ro Leau kaj la Delegacio por la akcepto de lingvo helpanta internacia, kaj la Klubo decidis fondi propagandan komitaton de kvin membroj, kiu havas la komision unupartite komunikiĝi kun la Delegacio en Parizo kaj en la plej konvena maniero helpi ĝian agadon, aliparte en la venonta tempo entreprenigi la eldonadon de verkoj en kaj pri Esperanto.

Inter la alestantoj oni rimarkis interalie la vice-prezidanton de la Reĝa Sveda Akademio por la Liberaj Artoj, la 77-jara majoro kaj arĥitektisto A. V. Edelsvärd, kiu tiam enskribis sin en la klubo.

*

— **La gazetoj Stokholmaj kaj Esperanto.**

»*Vårt Land*« n-ro 75 enhavis artikolon pri la Esperanta agado de »Södertelje Tidning.«

»*V. L.*« n-ro 95, »*Stockholms-Tidningen*« n-ro 3,463 kaj »*Stockholms-Dagblad*« n-ro 190 avizis pri la kunveno, estonta la 26-an de aprilo, de Klubo Esperantista Stokholma. En la tago post la fariĝo de tiu ĉi kunveno pri ĝi parolis la sekvantaj gazetoj: »*Vårt Land*« n-ro 97, »*Stockholms Dagblad*« n-ro 193, »*Stockholms-Tidningen*« n-ro 3,464, »*Svenska Dagbladet*« n-ro 112, »*Aftonbladet*« n-ro 97, »*Socialdemokraten*« n-ro 98.

En n-ro 110 de »*Vårt Land*« (13. V.) estis legata artikolo pri la propono de s-ro Leau kaj la Delegacio por internacia lingvo helpanta, kies eĥo estis en »*Sth. Dbl.*« n-ro 222 kaj »*Sth. Tdn.*« n-ro 3,479.

Rakontodonoj pri la kunveno de l' Klubo Esp-a Stokholma, la 22-an de majo, enhavis »*V. L.*« n-ro 118, »*Sth. Dbl.*« n-ro 235, »*Sth. Tdn.*« n-ro 3,485, »*Sv. Dbl.*« n-ro 137 kaj »*Dagen*« n-ro 118.

El Svisujo kaj Italujo.

— **El Locarno** en Svisujo nia sveda samideano d-ro Asklöf sendis al ni la n-ro de la 27-a de aprilo de l' gazeto »*La Cronaca Ticinese*«, presata en itala lingvo, kiu donas en la unuaj du kolonoj de sia unua paĝo tre favoregan artikolon pri Esperanto, kaŭzitan de la energia propagando de la francaj amikoj de Esperanto speciale ĉe la sciencularo.

Esperanto en la francaj Alpoj.

Inter la svisuja limo de Francujo kaj la valo de Chamonix (Ŝamuni) tiom konata pro la Monto Blanka, la grandegulo de la Alpoj, kuŝas la Giffra (Ĵifra) valo, malpli glora, sed tamen tute tiel same pentrinda. Ĉirkaŭata de arbaraj montoj kiuj mem apogiĝas kontraŭ altaj ŝtonegaj montegoj kronataj de eternaj neĝoj, tiu ĉi valo estas entute ĉarma, precipe ĝia supra parto.

Tial, tuj kiam alvenas la varma kaj bela sezono, alkuras amase el ĉiuj landoj vojaĝantoj kaj turistoj por vizitadi la belaĵojn kiujn la naturo, ĉe ĉia paŝo, dissemis en tiu rava lando. Kelkaj el ili, nur unu aŭ du tagojn povante uzi, kontentiĝas admiri preterirante la mirindan vidaĵon kiu, antaŭ iliaj okuloj disvolviĝas: la duoblan aŭ eĉ trioblan montaron multkoloran, kies akraj altaĵoj kiel grandega punto desegnas en la ĉiela bluaĵo iliajn strangajn formojn kaj kies deklivoj estas sulkigitaj de arĝentaj riveretoj saltogantaj de ŝtonegoj sur ŝtonegojn kaj kiuj fariĝas fine akvofaloj bruegaj kaj ŝaŭmaj. Aliaj, forlogitaj de la beleco de la landaĵo, tie loĝadas kelkajn semajnojn aŭ eĉ la tutan someron por mallaciĝi, reakiri siajn fortojn malkreskigitajn pro la troa laborado aŭ la malsano, kaj spiri de la montoj la puran kaj vivigantan aeron tute plenan je la bonodoro de alpaj plantoj. La plej kuraĝemaj suprenrampas la ŝtonegojn kaj pintojn krutajn kaj neĝkovritajn. Por la malpli fortikaj, la virinoj kaj la knaboj estas ĉarmaj supreniroj sur verdajn montetojn aŭ ĝentilaj promenadoj en la ebenaĵo tra florantaj herboj aŭ tra la abiaj arbaroj sur freŝaj vojetoj kiuj, inter la mola musko, malvolviĝas kiel serpentoj.

Ne malproksime de la fino de tiu ĉi valo, en la plej pentrinda parto, kuŝas la malgranda urbeto Samoëns, loĝadejo preferita de fremduloj. Tie, dum la somero la vivado estas tre agrabla dank' al la fremda societo kiu estas

tre multa kaj elekta kaj dank' ankaŭ al la belaĵoj kiujn la naturo disjetis senŝpare en la tuta ĉirkaŭaĵo. Sed kiam la vizitantoj, migrantaj gastoj, forpelitaj kiel hirundoj per la malvarma aŭtuna vento, forlasis la regionon, kiam alvenas la vintro kun siaj glacioj, kiam la montoj, la kampoj kaj la vojoj kovriĝas, per dika neĝa tapiŝo, kiel la tagoj fariĝas malgajaj kaj unutonaj! La naturo estas ĉiam bela kaj majesta, eble eĉ pli bela kaj pli majesta, sed la admireco estas floro kiu floreĝas nur je sunradioj kaj kiun la malvarmo senfresigas kaj velkigas. La tagoj forflugas plimalpli rapide dank' al la ĉiutagaj aferoj, sed la vespertempoj, tiuj longaj vintraj vesperoj! kiom ili daŭras malgaje kaj senfine! Ĉar Samoëns estas malgranda urbeto loĝita nur de 500 loĝantoj, tie ĉi la amuzaĵoj entute mankas, la societo estas malmulta kaj la objektoj de interparolado estas preskaŭ ĉiam similaj kaj ne tre interesaj.

Ĝis nun ni havis por pasigi tiujn longajn vesperojn nur la legadon de la gazetoj kaj de kelkaj malmultaj verkoj kaj la ludojn; sed dum la lasta vintro unu el niaj amikoj, jam malnova esperantisto, sinjoro Charvin, juĝisto en Tanninges, najbara urbeto, parolis pri l' Esperanto al unu el ni kaj pruntedonis al li la francan lernolibron de la lingvo Esperanto de s-ro de Beaufront kaj ankaŭ kelkajn Esperantajn verkojn. Nia kolego, loĝita de la facila ellernebleco kaj de la beleco de tiu lingvo, trovis baldaŭ unuan, poste duan kaj trian adepton kaj post apenaŭ dekkvin tagoj ni fariĝis grupeto de ses esperantistoj. De tiu momento ni kunvenas ĉiuvespere por kunlernadi l' Esperanton. Ni pensas helpi la komencantajn esperantistojn klarigante tie ĉi al ili nian manieron de lernado, ĉar ĝi estis por ni tre fruktoporta. Unu el ni legas laŭte la bonegan komenton pri la gramatiko de s-ro de Beaufront kaj ni ĉiuj provas traduki france kaj Esperante la ekzemplojn klarigantajn ĉian regulon. Poste,

ĉiu laŭ sia vico legas laŭte ĉu la »L. I.«, ĉu »l' Espérantiste«, ĉu ian Esperantan verkon, kiujn tradukas la aliaj. La laŭtvoĉa kaj komuna legado enhavas du profitojn: ĝi kutimigas nin elparoli bone kaj sekve paroli pli kompreneble, krom tio ĝi devigas atentigi kaj ekzameni detale ĉiun frazon eĉ ĉiun vorton, dume en la mallaŭta legado oni kontentiĝas ofte nur je supra komprenejo. Ifoje ni penas traduki francan tekston Esperante; ĉiu proponas sian ideon kiu post disputo pli-malpli longa estas akceptita aŭ forĵetita. Tiuj kunverkitaj tradukoj estas efektive praktikaj gramatikaj ekzercoj. Kompreneble dum la kunvenoj ni povas paroli Esperante. En la komenco la parolado estis iom ĝenante, sed nun ni jam venkis la unuajn malfacilaĵojn.

Ni rimarkis ke la tradukoj de fremdaj verkoj en Esperanto estas pli interesaj kaj pli instruigantaj ol la samaj tradukoj en nacia lingvo. La Esperanto ja elmontras pli bone la belaĵojn de la originala verko kaj la spiriton de la verkisto.

Jen kiel dank' al la lingvo internacia de d-ro Zamenhof ni pasigis tre agrablan vintron kaj kvankam nun la printempo invitas nin je la promenado, ni neniam forlasas nian preferatan okupadon kaj se kelkaj esperantistoj alvenus ĉe nian urbeton dum la proksima somero, ni pensas povi paroli kun ili en nia kara lingvo.

Ni sendas al vi kiel ekzemplon de nia laborado malgrandan tradukon, kiun vi povas enpresii en la »L. I.« se vi juĝos ĝin eldoninda.

Grupeto Esperantista de Samoëns.

DIVERSAĴOJ.

Informejo de esperantistoj.

Mi tre deziras korespondadi kun abelamantoj pri abeloj. Mi povas sendi priskribojn de miaj manieroj por administro abelaja kaj ankaŭ elsendi fotogr. vidaĵojn de la sistemoj de miaj abelujoj. — Adreso: Ĉusovaja, st. Permskoj jel. dor., Permskoj gub., Rusujo, V. T. Evdokimov.

Rebusoj.

I.

— De Paul de Lengyel. —

ulh ulh ulh ulh	ulh ulh ulh ulh	ulh ulh ulh ulh
ulh ulh ulh ulh	ulh ulh ulh ulh	ulh ulh ulh ulh
ulh ulh ulh ulh	ulh ulh ulh ulh	ulh ulh ulh ulh

ulh ulh ulh ulh	ulh ulh ulh ulh
ulh ulh ulh ulh	ulh ulh ulh ulh
ulh ulh ulh ulh	ulh ulh ulh ulh

ulh ulh ulh ulh	ulh ulh ulh ulh	ulh ulh ulh ulh
ulh ulh ulh ulh	ulh ulh ulh ulh	ulh ulh ulh ulh
ulh ulh ulh ulh	ulh ulh ulh ulh	ulh ulh ulh ulh

II.

— De N. Studenov. —


a	Oni translokigu la literojn tiamaniere,
i k k	ke oni povus legi de maldekstre al dek-
n n o o o	stre kaj de supre al malsupre similajn
o o r	vortojn.
r	

La solvojn de tiuj ĉi rebusoj ni presos en la n-ro 10. Ni petas tiujn inter la legantoj, kiuj sin intereseas pri tio, ke ili alsendu la solvojn al la administracio de nia gazeto. La nomojn de la solvintoj ni presos kune kun la solvoj mem.

Oni povas ankoraŭ ensendi la solvojn de l' rebusoj trovataj en la n-roj 5 kaj 6.

Solvoj de la rebusoj trovataj en la n-ro 2—3—4: I. Forprenu la plej supran (sub *a*) kaj la plej malsupran (super *e*), poste translokigu la dekstran (antaŭ *d*) maldekstren (apud *b*).

II.



III.

o	IV.
so	Beto
aso	
maso	betulo
amaso	

V.

Boao, boato. (»Boato« ne estas sen-»t«-a, ĉar ĝi enhavas »t«-on; sed kiam ĝi sen-»t«-igas, ĝi fariĝas »boao«. — Nur s-ro Bezin solvis ĝuste.

Solvis ĉiujn rebusojn: neniu. Ne ĉiujn rebusojn: Jos. Mifetz, K. Šidlovski, I. E. Moskovčenko, fraŭlino Caroline Wieslander, Karl Bezin (ankaŭ la rebusojn trovatajn en la n-ro 1), Vsev. Lojko, malgranda knabino, S. N. Savkevič, E. Radvan-Ripinski, A. C. Coutinho, N. Studenov, V. Gedroic.